# Eta kateĥismo por la suba klaso

de

August Strindberg

tradukita de

Gunnar Gällmo

Titolo de la svedlingva originalo 1884: *August Strindbergs lilla katekes för underklassen*

La aŭtoro mortis en 1912

Esperanta traduko © Gunnar Gällmo 2016

**Enhavo**

Eta kateĥismo por la suba klaso 5
Postparolo de la tradukinto 44

## Eta kateĥismo por la suba klaso

Unua ĉapitro:

La socio

*Kio estas la socio?*

Formo de kuna vivado, evoluinta sub influo de la celo de la supera klaso teni la suban klason sub si.

Tio estas la malkaŝita sekreto de la socio. Tial tiuj teruraj krioj ĉiam, kiam ĝi estas esprimata, kaj tiuj longegaj tiel nomataj refutoj, kiuj iĝas nur stultaj kontraŭdiroj.

Sed la supera klaso, kiu edukis nin kaj verkis la librojn, kompreneble havas ĉiujn argumentojn je sia dispono.

La supera klaso asertas, ke ĉiu suba klaso estas libera levi sin "per laboro" kaj iĝi supera klaso.

Tio estas mensogo! La plej kutima maniero iĝi supera klaso estas per pli-malpli laŭleĝa ŝtelado. Plej facile "levas sin" la komercisto. Sed anstataŭ tiam agnoski tiun, kiu per laboro "levis sin", oni mokas lin. Suban klason, kiu

levis sin kaj iĝis supera klaso, oni malestime nomas *parvenuo*.

La klasojn oni povas nomi ankaŭ “la utilaj” kaj “la neutilaj”.

Ĉu oni do komprenas kial la utila estas tiel malestimata (= sklavoj de la *kruda* utilo) kaj la neutila (= belaj artoj kaj simile) tiel honorigata? Kompreneble, la neutilaj donas al si mem kaj al siaj neutilaĵoj la honoron!

Oni asertis ankaŭ ke la ŝtato estas organismo kaj ne invento. Ankaŭ la ĥolera bakterio estas organismo, sed ne pro tio bonega. Ankaŭ putranta korpo estigas organismojn!

*Kio estas la supera klaso?*

La konsumantoj, la regantoj

Regado ne estas laboro. Nur ofico, maksimume. Komparu la reĝajn personojn, iliajn ĉaskunvenojn, balojn, vojaĝojn kaj aliajn sekretajn amuzaĵojn.

*Kio estas la suba klaso?*

La nutrantoj, la regatoj

Kiuj per siaj manoj produktas manĝojn, vestojn, loĝejojn kaj hejtaĵojn, tiuj estas la laborantoj, la nutrantoj.

*Kiujn ilojn uzas la supera klaso por teni la suban klason sub si?*

Religion, politikon, leĝojn, sciencojn, artojn kaj moralon.

Ĉiuj tiuj aferoj evoluis el pli-malpli artefaritaj bezonoj, sed plejparte sub la kontrolo de la supera klaso kaj kun la celo servi kaj konfirmi ĝian potencon.

## Dua ĉapitro:

## La mensogoj de la supera klaso

### Unua paragrafo: Religio

*Kio estas religio?*

Bezono ekestinta en pli malaltaj evolufazoj, kaj uzita de la supera klaso por teni la suban klason sub si.

La supera klaso sekrete ridas pri religio, sed opinias ke "necesas religio por la popolo". Sincera ateisto antaŭnelonge deklaris ke estas domaĝo malfeliĉigi la suban klason forprenante de ĝi ĝian religion.

La profundan signifon de religio oni povas vidi en tio, ke ateistoj defendis la superstiĉon pri la eŭkaristio. La superstiĉo estas utila por la supera klaso.

*Kiujn iloj la religio uzas por tio?*

Timigon kaj konsolon

Frederiko 2a, nomita "la granda", faris ĉi

tiun konfeson:

“Ĉiuj leĝfarantoj kreis diojn kaj interparolojn kun dioj por unuigi la popolojn. Kredu min, kiam ni sentas timon, tiam ni elpensas diablojn kaj inferojn. Timo kreis la diojn. Forto kreis la reĝojn.”

*Per kio la religio timigas?*

Per malbeateco aŭ eternaj punoj por tiuj, kiuj ne obeas la superan klason.

Tial “La lasta juĝo” de Mikelanĝelo estas rigardata kiel la plej granda el ĉiuj artaĵoj.

Ĝi plej timigas!

*Per kio la religio konsolas?*

Per espero pri beateco en venonta vivo por tiuj, kiuj en ĉi tiu vivo laboras kaj suferas por la supera klaso.

*Kion ni scias pri Dio?*

Nenion!

*Ĉu ekzistas venonta vivo?*

Oni ne scias, kaj ne gravas por ni. Tial ni devas vivi por ĉi tiu!

La supera klaso ĉiam senĝene servas sin mem en ĉi tiu vivo, kaj invitas la suban klason al la ĉielo.

*Kiu estis Kristo?*

Neordinara homo, kiu volis informi kaj savi la suban klason, siamaniere.

Bedaŭrinde, li kredis ankaŭ je ĉielo, kaj anstataŭ montri al la laborantoj kaj prematoj kiel ili bone aranĝu por si surtere, li indikis la nekonatan.

Tial, Kristo arĥaikiĝis kaj nuntempe taŭgas nur kiel ilo per kiu la supera klaso konsolas la suban, kiam tiu estas tro efike senplumigita.

*Kiel ni povas scii ke li ne estis de Dio?*

Per la fakto ke li estis homo.

Ĉu oni devu malŝpari tempon pruvante la absurdecon de la absurdaĵoj?

*Ĉu ne per io alia?*

Jes, ankaŭ per tio ke li neniel pruvis sian diecon, kio estus kaj facile kaj saĝe.

Sur Place de la Concorde staras obelisko, 1400 jarojn pli aĝa ol Kristo kaj per ŝtonskribo pruvanta la ekziston de Ramseso 2a.

Kial ni ne havas tian pri la vivo de Kristo, ne samtempan dokumenton?

*Kio do estas la natura religia sento?*

La kutimo ekde la infanaĝo sin fordoni al tiaj sentoj.

La religia sento de la mahometano ordonas al li preni multajn edzinojn.

La korsiko sentas sin malbeata ĝis li plenumis sian religian devon murdi sian malamikon.

*Kio estas konscienco?*

La sento ne esti obeinta regulon.

Kaj laŭ la agoj de la supera klaso, tiu ne havas ajnan konsciencon. Tute nature, ĉar ĝiaj reguloj ekzistas nur por la suba klaso. Por ili mem, validas nur unu leĝo: Kion mi faras, tio estas ĝusta!

*Kiu faras la regulojn?*

La supera klaso!

La supera klaso do regas nian konsciencon per siaj reguloj.

La kvakeroj, kiuj rifuzas militservi, obeis sian prudenton, kaj ili havas malbonan konsciencon ĉar ili rompis la regulon de la supera klaso.

Sed per la potenco de la kutimo, la reguloj de la supera klaso tiom enradikiĝis ke ili foje aspektas kiel konscienco. Do, kiam la supera klaso apelacias al nia konscienco, ĝi nur aperigas la memoron pri tiu regulo.

*Ĉu la homo povas vivi sen religio?*

Jes, por la supera klaso, kiu havas la ekzistorimedojn, tio estas facile, sed por la suba klaso, kiu vivas en ĉiama angoro pri sia ekzisto,

pli malfacile.

Kiam Numa Pompilius ne povis havi siajn amorantinojn nur por si, li sanktigis ilin kaj nomis ilin “vestaloj”.

Kiam Voltero ne povis havi siajn paperojn nur por si en certa loko, li tien metis himnaron.

Estus bone doni al la suba klaso la ateismon kiel religio, se ĝi nepre bezonas iun.

*Ĉu ne estus pli bone havigi al la suba klaso ekzistorimedojn ol religion?*

Jes, multe pli bone.

La sata supera klaso riproĉas al la malsata suba klaso ke ĝi pensas nur pri manĝado!

Kaj la suba klaso akceptas tiun riproĉon.

Dua paragrafo: Politiko

*Kio estas politiko?*

Ŝtatarto, aŭ la arto de la supera klaso teni la suban klason sub si. Politiko povas signifi ankaŭ fraŭdon.

*Kio estas eksterlanda politiko?*

La kunlaboro inter la superaj klasoj de la diversaj nacioj.

Tial la supera klaso estis sufiĉe ruza por monopoligi la postenojn de eksterlandaj ministroj; kaj sekretigi iliajn intertraktadojn. La parlamento tial devus fari tiujn nomumojn kaj sola decidi pri la rilatoj kun fremdaj ŝtatoj.

La ambasadoj kaj konsulejoj estas policagentoj por la supera klaso.

Se oni en fremda lando ekrilatas kun homoj, tiuj en la ambasado aŭ konsulejo ĉiam demandas kiu oni estas. De la respondo poste dependas onia forto kaj farto. Se oni estas amiko de la suba klaso, oni estas denuncata kiel suspektinda persono.

*Kio estas enlanda politiko?*

La gardado de la interesoj de la supera klaso kontraŭ tiuj de la suba.

La sola tasko de la parlamentoj estas aprobi impostojn. La impostoj estas uzataj por oficoj kaj salajroj al la supera klaso.

La parlamento laboras nur por trovi kiun oni devigu pagi la imposton.

*Kio estas suvereno?*

La komisiito de la supera klaso, kiu gardas ĝiajn interesojn.

Suverenoj povas esti forigataj plurmaniere.

Oni povas faligi ilin per revolucio. Sed revolucion povas fari nur la militaj fortoj. Tial tiuj eternaj proponoj pri armeorganizo.

Oni povas forigi ilin per ĉikanado, nuligante la apanaĝon. Ĉar, kvankam ili diras sin kredi je la ĉielo, ili ne regas senpage.

Sed la plej granda baro estas la timo de la suba klaso ne esti rigardata kiel "dignaj homoj".

*Kial la supera klaso amas heredajn suverenojn?*

Por ke la interesoj estu plejeble malmulte ĝenataj, kaj por ke oni en la suba klaso gravuru la ideojn pri la dia origino de la suvereno per heredo.

Bernadotte, kiu estis pertrompe logata de kelkaj oficiroj post la revolucio en 1809, tamen nomisi sin reĝo "pro la Dia Favoro".

*Sur kiu potenco apogas sin la suvereno?*

Sur la kapitalo, la superstiĉo, kaj la kruda forto.

La suvereno en konstituciaj landoj havas pli da potenco ol oni kredas. Li havas ĉiujn oficojn, ĉiujn distingojn, ĉiujn stipendiojn, ĉiujn reptilifondusojn, ĉiujn reptiliojn (al kiuj li garantias senpunecon) je sia dispono.

*Kiujn rimedoj la suba klaso havas por gardi siajn interesojn kontraŭ tiuj de la supera klaso?*

Voĉdonrajton, kie tia ekzistas.

*Ĉu ĝi ne havas aliajn rimedojn?*

Revolucion.

*Kiam revolucio estas laŭleĝa?*

Kiam ĝi sukcesas.

*Kiel ĝi povas tiam iĝi laŭleĝa?*

La revoluciuloj faras leĝon, kiu deklaras ke la revolucio estas laŭleĝa.

Tiel faris la anarkiistoj en 1809. Kaj la nun reganta reĝa familio certe trovas sian pozicion laŭleĝa.

*Ĉu revolucio estas rekomendinda?*

Tio dependas de ĝiaj ŝancoj sukceci.

Engelbrekt, Gustavo 1a, Karlo 11a kaj Gustavo 3a faris sukcesajn revoluciojn, tial oni honoras ilin kiel heroojn, kvankam ili rompis ĵurojn kaj leĝojn.

Tria paragrafo: Leĝoj

*Kio estas leĝoj?*

Elpensaĵo de la supera klaso por teni la suban klason sub si per tiel nomata laŭleĝa maniero.

*Ĉu la supera klaso skribis la leĝojn?*

Jees!

*En sia intereso kontraŭ la suba klaso?*

Jes, kompreneble!

*Kion la supera klaso unue postulas de la suba klaso rilate al la leĝoj?*

Respekton al la leĝoj.

Tial la juĝistoj ne povas esti eksigataj (de la suba klaso).

*Ĉu oni do devas respekti la leĝojn?*

Jes, kiam ili meritas respekton.

Se oni senkondiĉe respektus ĉiujn leĝojn, oni ja neniam povus havi pli bonajn.

Kiel la leĝkomitato povus labori por plibonigi la leĝojn, se ĝi ne malestimus la ekzistantajn?

Ĉimomente, ĉiuj katolikoj, judoj, baptistoj kaj aliaj, kiuj neas la "puran evangelian kredon" en Svedio, povas esti enkarcerigataj.

Kaj tamen oni postulas respekton por tiu leĝo, malgraŭ la fakto ke la justicministro mem publike esprimis sian malestimon al ĝi.

*Ĉu ne la parlamento estas leĝfaranta asembleo?*

Jes foje, sed la parlamento ne estas la suba klaso.

*Ĉu la parlamento do ne esprimu la dezirojn kaj de la supera klaso kaj de la suba?*

Ne, nur tiujn de la suba klaso.

*Ĉu tio ne estas maljuste?*

Ne, ĉar la supera klaso povas postuli nur unu justecon: esti forigata.

*Kial la regantoj estas venĝantoj?*

Ĉar ili venĝas!

*Kion ili venĝas?*

La pravigitajn atakojn de la suba klaso al la supera.

Ĉiujn atakojn de la suba klaso al la supera oni nomas venĝo (vulgara venĝo, fia venĝo ktp), sed ĉiujn atakojn de la supera klaso al la suba oni nomas puno.

Kiam suba klaso mortigas superan, oni

nomas tion murdo, kaŝmurdo ktp, sed kiam supera klaso mortigas suban, oni nomas tion ekzekuto, mortigo ktp.

La supera klaso, kiu havas la armitan potencon, ne devas murdi kaŝe, kaj ne hontas fari tion publike, kaj pri tio ĝi fanfaronas.

*Kio estas puno laŭ leĝa kondamno?*

La venĝo de la supera klaso pro la atakoj de la suba al la leĝoj deciditaj de la supera.

La suba klaso devus rigardi kiel sian devon venĝi ĉiujn maljustaĵojn, ĉar silentante kaj suferante oni agas maljuste al siaj proksimuloj.

La memvenĝon malpermesis la supera klaso, por eltordi la armilon el la manoj de la suba. La supera klaso monopoligis la memvenĝon kaj faris ĝin "laŭleĝa".

Kvara paragrafo: Sciencoj kaj artoj

Ekonomiko

*Kio estas ekonomiko?*

Scienco elpensita de la supera klaso por havigi

al si la fruktojn de la laboro de la suba.

*Kiel oni nomas la fruktojn de la laboro de la suba klaso?*

Kapitalo.

*Ĉu kapitalo povas ekzisti sen laboro?*

Ne!

Tial la kapitalo devus esti la sklavo de la laboro, kaj ne inverse.

La arabo en la dezerto, kiu trovas sakon de oro, mortos pro malsato.

La grandbienuloj en Friulo estas malriĉaj, ĉar ĉiuj iliaj kamparanoj kaj farmetistoj elmigris kaj ili ne povas dungi laboristojn.

Dum la tajlorstriko en Parizo, grandaj entreprenoj falis kaj devis bankroti.

La ekonomikistoj el la supera klaso certe diras ke kapitalo estas akumulita laboro, sed ili tre singarde ne diras kies laboro estas akumulita. Ili ŝajnigas ke estas tiu de la kapitalisto.

*Kiel do la kapitalo povas regi la laboron?*

Kiam la kapitalisto retenas la ŝparaĵojn de la laboristo, kiuj ĝuste estas la kapitalo, tiam li malhelpas lin regi la kapitalon.

La kapitalo regas la laboron per armila potenco kaj fortenado de ekzisto- kaj produktorimedoj.

La filistro ĉiam havas la gvardianon malantaŭ si.

Grandajn strikojn tial subpremas armila potenco!

*Kiujn rimedojn la laboristo posedas por provi malhelpi la tiranecon de la kapitalo?*

Tre malmultajn, tiel longe kiel laŭleĝaj strikoj estas subpremataj per kontraŭleĝa armilpotenco.

*Sed certe ekzistas kelkaj rimedoj?*

Jes, striko; sed por tio necesas kapitalo.

*Kiel la laboristo havu al si kapitalon por striko?*

Per konsumaj kooperativoj kiuj malgrandigas liajn elspezojn, kaj per laboristaj bankoj kiuj pruntedonas monon dum strikoj

*Ĉu per tio la problemo estas solvita?*

Ne, necesas ankaŭ la eksproprigo de la tero.

*Tio ja estas limigo de la posedrajto?*

Ne pli granda ol aliaj eksproprigoj, ekzemple kiam privataj fervojoj eksproprigas ŝtatan teron.

Ĉi tie oni postulas nur eksproprigon de privata posedaĵo por la publika bono.

*Kial la prezo altiĝas kiam varo malabundas?*

Ĉar la komercisto ekspluatas la mizeron de aliaj por tropagigi.

*Kiel oni nomas tion en la ekonomiko de la supera klaso?*

Tion oni nomas "la leĝo pri propono kaj postulo".

Filozofio

*Kio estas filozofio?*

Serĉado de la vero.

*Kiel la filozofio do povas esti amiko de la supera klaso?*

Tiel ke la supera klaso pagas la filozofojn por trovi nur agrablajn verojn.

*Kaj se ili trovas malagrablajn?*

Tiam oni nomas tiujn mensogoj, kaj ne pagas la filozofon.

Historio

*Kio estas historio?*

La rakonto pri la pasinteco, kondiĉe ke ĝi estas prezentata en lumo favora al la supera klaso.

*Kaj se la lumo iĝas malfavora?*

Tiam oni nomas tion skandalo.

*Kio estas skandalo?*

Ĉio kontraŭa al la supera klaso.

*Kio estas amo al la patrolando?*

Evoluinta formo de posedosento. Estas mia lando, do la plej bona. Tiel parolas ĉiuj nacioj sen kompreni ke ili esprimas nur subjektivan stultecon, ĉar nur unu lando povas esti la plej bona. Kio ne malhelpas ke ĉiuj povas esti same bonaj.

*Kion oni ŝuldas al sia patrolando?*

Nenion!

La edukadon pagis la gepatroj, loĝadon kaj manĝon same, kaj se oni ekhavas taskon, oni pagas per sia laboro. La protekton oni pagas per la imposto.

Kaj tion komprenas la patrolando, kiu senĉese akceptas novajn patrolandamikojn de kiu ajn nacieco, se ili nur vivis du jarojn en la lando kaj pagas la postulatan sumon.

Estetiko

*Kio estas estetiko?*

La arto laŭdi aŭ malestimigi artaĵojn!

*Kiujn artaĵojn oni laŭdu?*

Tiujn kiuj gloras la superan klason.

Tial Rafaelo kaj Mikelanĝelo estas la plej famaj, ĉar ili gloras la religiajn mensogojn de la supera klaso.
Shakespeare gloris la reĝojn, kaj Goethe gloris sin mem kiel la verkiston de la supera klaso.

*Kaj la aliaj artaĵoj?*

"Ne ekzistu aliaj."

Zola priskribis la suferojn de la suba klaso kaj la krimojn de la supera, tial li estas nomata fekverkisto. Feko estas la nomo kiun la supera klaso donas al ĉio ligata al la suba.

La natursciencoj

*Kial la natursciencoj estas malbone enskribitaj ĉe la supera klaso?*

Ĉar ili montras ke la socio estas kontraŭ la sana naturo.

*Ĉu ekzistas ankaŭ malsana naturo?*

Jes!

*Ekzemple?*

La nuna politika sistemo.

Kvina paragrafo: Moralo

*Kio estas moralo?*

Justecosento de la supera klaso, disciplinita por delogi la suban klason vivi trankvile.

*Ĉu la moralo estas parto de la homa naturo ekde la komenco?*

Tute ne! Ĝi ŝanĝiĝas laŭ klimato, terkvalito kaj la plaĉo de la supera klaso.

En sudaj landoj, virino "grandmonda" malkovras sian bruston en homa rondo kiam ŝi

mamnutras bebon, en Svedio nur por kavaliroj dum balo.

*En kiu okazo la moralo estas plej rigora?*

En la rilato inter la seksoj.

*Kial do?*

Ĉar de tiu dependas la kresko de la suba klaso, kiu se tute libera povus iĝi malutila por la supera.

*Kiu fondis la geedzecon?*

La virino, kiu tiel kreis novan superan klason, evitante laboron.

La virino inventis la prostituon, aŭ la ideo postuli pagon por siaj favoraĵoj.

La viro ne postulas pagon. Li pagas.

La virino estigis sifilison per malĉastado. La viro ne.

Se naskiĝas infano ekster geedzeco, li sola devas elaĉeti la infanon en la infandomo. La virino ne!

Ĉu do la virino ne estas protektata?

En Francio, oni ne rajtas serĉi la patron. Ĉar

la patreco ne estas pruvebla! Jen justo!

Kokrita edzo estas ridinda, kokrita edzino estas tragika.

Ĉu do ekzistas du moraloj? Unu pli milda por la virino, unu pli rigora por la viro?

Edzo kiu kokras sian edzinon ne tiel faras malĝustecon al ŝi, sed edzino faras malĝustecon, unue ĉar ŝi postulas pagon por fideleco al la edzo, due ĉar ŝi eble devigas lin vivteni infanojn kies patro li ne estas. Tio pro simpla natura leĝo (nome ke la virino gravediĝas, sed la viro ne), do ne temas pri moralo.

*Kio estas la geedzeco?*

Ekonomia aranĝo, per kiu la viro estas devigata labori por la virino, kies sklavo li iĝis.

En la subaj klasoj, edzo kaj edzino laboras per la korpo, sed la edzo plej; en la meza klaso la viro laboras kaj la virino administras; en la plej superaj, la viro havas oficon kaj la virino amuziĝas.

La emancipiĝintoj diras ke la virino ne naskiĝis por naski infanojn. Kiu do faru tion?

La emancipiĝintoj diras ke ili volas iĝi utilaj. Tio estas mensogo. Ili forlasas familion kaj

infanojn por fari oleajn pentraĵojn kaj tinti sur piano. Ĉu tio estas utila! Ĉu ne estas pli utile flegi la infanojn, nun lasataj al la sklavinoj (servistinoj).

Kio estas la tasko de la geedzeco: naski infanojn kaj eduki ilin. Ĉiuj vortoj pri la amuzo de la geedzeco en kunestado estas nur babilaĉo.

*Kio iĝis la rezulto?*

Ke la viroj ne volas edziĝi!

La viraro estas lacepelita pro trostreĉado liverante al la virino luksaĵojn kaj amuzojn. Tial ili malmultiĝas. La militoj, en kiuj la virinoj singarde ne partoprenis, same detruis la viraron.

Tial la virinoj pli multas kaj la needziĝintaj krias.

*Kaj la sekvo de tio?*

Prostituo. En la oriento poligamio, en la okcidento senseksiĝo.

La mormonoj provis solvi la problemon per poligamio.

Estas la senseksiĝintoj kiuj aperas en la

nomo de la patrinoj kaj volas malaperigi la interseksajn malsamecojn difinitajn de la naturo. Tial ili vestas sin kiel viroj kaj volas iĝi viroj. Tio estas la sekreto de la emancipiĝo.

Tial la senseksaj krias kiam oni volas paroli pri viroj kaj inoj.

Ili estas nek nek!

*Ĉu iĝis iuj aliaj sekvoj?*

La mizera stato de la nedziniĝinta virino kaj ŝia postulo havi laboron.

*Ĉu tiu postulo povas esti kontentigata?*

Ne nun, kiam la labormerkato estas tro plena.

Se ĉambro estas tro plena, tiel ke ekster ĝi staras vico, ĉu oni tiam povas enlasi pliajn?

Kiu labormerkato ne estas tro plena sed staras malplena?

La kuirejo kaj la infanĉambro.

Sed la sinjorinoj postulas ke la viroj estu elpelataj por ke ili povu eniri. Tiel okazis en Anglio, kie la edzinoj akceptis pli malaltajn salajrojn ol la viroj ĉe la teksisto, pro kio ili ricevis la oficojn kaj la viroj sidas hejme kun la

infanoj. La viro ricevis panon pro kompato, ĉar la leĝo ne postulis ke la edzino vivtenu la edzon, nur la edzo la edzinon.

*Ĉu la virino estis pli subpremata ol la viro?*

Ne, malpli!

Oni ĉiam evitigis ŝin de militservo, politikaj taskoj kaj tiel plu.

*Sed ŝi ne partoprenis la leĝofaradon?*

Ŝi ne volis, sed preferis stari super la leĝo!

La virino elektis sian pozicion. Nun ŝi bedaŭras tion kaj provas avanci per trompado.

*Kiam la virino havu voĉdonrajton?*

Kiam ŝi plenumas civitanajn devojn (militservas) kaj laboras.

El militservo estas esceptataj tiuj, kiuj naskas infanojn.

Por la pluvivo de la homaro necesas kvar infanoj. Du infanoj anstataŭu la gepatrojn, kiam

tiuj mortos, la tria aliajn mortintojn kaj negedziĝintojn.

*Kiam edziniĝinta virino havu posedrajton?*

Kiam la geedza rilato nuliĝis. Kiam la viro ne plu devas esti la sola familivivtenanto kaj la virino laŭleĝe devas kontribui al la vivtenado de siaj infanoj kaj de si mem.

Se ne, la viro povas esti devigata vivteni riĉan virinon, kiu el la elspezoj de la familio forprenis siajn enspezojn.

Ĉiun kapitalon, ĉiun posedaĵon kreis la viro, kaj tial ĝi apartenas al li, ĉar kondamnita sola vivteni la familion.

Tiel estas juste ke la tiel nomatan posedaĵon de la virino administras li, kaj ke la eretoj kiujn povas liveri ŝia doto pagu lian fraŭlajn ŝuldojn, per kiuj li lernis profesion kaj povas vivteni familion.

*Kiun moralan leĝon havas la supera klaso?*

La bontrovon!

*Kion signifas "maldeca"?*

Tion, kiu rompas la portempan moralan leĝon de la supera klaso.

*Ĉu estas maldece malkovri sian korpon?*

Ne en varmaj landoj, nur en malvarmaj, kaj tie ne ĉiam!

*Ĉu estas maldece montri la kaŝitan?*

Ne en rekonitaj artaĵoj!

*Kiuj artaĵoj estas rekonitaj?*

Tiuj kiuj plaĉas al la supera klaso!

Tria ĉapitro:

La parolturnoj de la supera klaso, por trompi la suban

*Unue: Reformu vin mem antaŭ reformi aliajn!*

*Respondo:* Se ni reformus nin mem, via socio falus, ĉar ĝi estas fondita sur mensogo kaj maldeco. Ĉar

*Se ni volus esti moralaj*

ni nuligus nian fidon kaj obeon al la reĝa familio, ĉar ne estas bona moralo fidi eminentulojn;

rifuzus militservon, ĉar ne estas bona moralo glavon preni;

elirus el la ŝtata eklezio, kiu perfortas la konsciencojn de infanoj;

neniam drinkus, pro kio la ŝtato perdus 14 milionojn nur da brandimposto;

ne plu aĉetus luksajn manĝaĵojn, trinkaĵojn kaj vestojn, pri kio la ŝtato perdus 27 milionojn da

doganoj kaj la industrio falus;

rifuzus pagi impostojn al ŝtatlukso kaj oficistoj;

ne metus niajn infanojn en la ŝtataj lernejoj, ĉar tie ili lernas ŝtatan mensogon kaj religian superstiĉon.

Ni do devas ne reformi nin mem, se la nuna socio pluvivu.

Anstataŭe ni reformu la socion forigante la superan klason kaj ĝiajn mensogojn.
Tiel ni ĉiuj iam estos reformataj.

*Due: Vi volas faligi la potencon por mem havi potencon.*

Jes, ĉar ni havas la rajton, kaj tial ni havas la potencon faligi la maljuston.

Ne, ĉar ni volas dividi la potencon kun la tuta suba klaso kaj tute ne porti ĝin solaj.

*Trie: Vi estas gvidataj nur de egoismaj interesoj.*

Ĉiujn interesojn gvidas egoismo, aŭ

memkonservinstinkto. Sed ekzistas egoismo pravigita: tiu de la suba klaso, kaj nepravigita: tiu de la supera klaso.

*Kvare: Vi nur provas ekhavi monon.*

Ne nur, sed ankaŭ! Ĉar sub la nunaj cirkonstancoj, mono estas potenco. Kaj sen tiu potenco, la supera klaso ne povas esti faligata.

La supera klaso ne devas provi ekhavi monon, ĉar ĝi jam rabis ĉion!

*Kvine: Vi malpurigas ĉion sanktan!*

Sankta estas ĉio, kion la supera klaso metis sub si.

Ĝi sanktigis la reĝon, sanktigis la posedon, sanktigis la familion kiel manĝinstitucio, sanktigis la perfortleĝojn.

Tial ni "malpurigu" ĉion sanktan.

Malpureco, por la supera klaso, signifas ĉiujn forĵetaĵojn. Ĝi forgesas ke ĝiaj plej bongustaj manĝaĵoj venas el tero, bone miksita kun forĵetaĵoj aŭ malpuraĵoj.

*Sese: Vi volas nur detrui, ne konstrui! Kion vi donos al ni anstataŭe?*

Ekzistas tiom da troaĵoj kiuj nur bezonas esti detruataj.

Se oni detruas superstiĉon kaj mensogon, certe oni ne devas konstrui novajn superstiĉojn kaj mensogojn.

Cetere, ĉiuj provoj novkonstrui renkontas malestimon kaj kontraŭstaron.

Tiel: estas malestimataj la proponoj fondi pacjuĝejojn anstataŭ la forigitaj militoj!

Tiel: estas malestimataj la liberaj eklezioj, kiujn ni volas konstrui anstataŭ la forigita ŝtata eklezio.

Tiel: estas malestimata la respubliko, kiun ni volas konstrui anstataŭ la ridinda monarkio.

Tiel: estas malestimata samnivela kaj kuna edukado, kiun ni volas havi anstataŭ privilegiata klasedukado.

Tiel: estas malestimataj civilaj geedzecoj, kiujn ni volas havi anstataŭ biblia konkubeco.

Tiel: estas malestimata la progresiva imposto, kiun ni volas havi anstataŭ la nuna.

Tiel: estas malestimata la ĝenerala voĉdonrajto, kiun ni volas havi anstataŭ la unuopa.

Tiel: estas malestimata la egaleco, kiun ni volas havi anstataŭ klasdiferenco.

Tiel: estas malestimata la suba klaso, kiun ni volas havi anstataŭ la supera.

*Sepe: Vi estas supersataj kaj ne scias kion vi volas.*

"Supersata" la supera klaso nomas tiun, kiun ne plu amuzas ĝiaj arlekenaĵoj en literaturo kaj arto, cele al forigo de la atento el seriozaj aferoj.

Ni trapenetris la trukojn de la supera klaso kaj ne plu admiras ĝin, tial ĝi nomas nin "supersataj".

Ni bone scias kion ni volas. Sed la supera klaso, per sia edukado, konfuzis niajn konceptojn tiel, ke ni ofte kontraŭdiras nin mem pri detaloj. Pri tio kulpas la supera klaso, sed estas nur merito nia ke ni tiel bone scias kion ni volas ĝenerale.

Tial la junularo povas protekti sin kontraŭ la sofismoj de la supera klaso nur per portempa

rifuzo legi ĝiajn librojn kaj gazetojn, evitante esti kune kun supera klaso. Niaj cerboj estas tro bone preparitaj de la supera klaso por ne doni eĥon kiam la supera klaso sonorigas la tonon.

Kiam oni dum longa tempo liberigis sin el la retoj, oni povas profiti legante iliajn parolturnojn. Tiam oni ricevas siajn plej bonajn armilojn el ilia armilejo.

Kiel ofte oni ne trovas liberalulojn, kiuj estas ege konservemaj pri certaj aferoj.

Bjørnson estas ateisto en religio, socialisto en politiko, sed biblia kristano en moralo.

Georg Brandes estas liberala en ĉio krom estetiko kaj virinaj aferoj.

La gazeto Tiden estas demokrata en ĉio krom en virinaj aferoj, kie ĝi estas senseksigita.

*Oke: Ĉiuj viaj reformprovoj ja fiaskis antaŭe.*

Jes, ĉar la kontraŭstaro de la supera klaso tiam estis tro forta; sed nun ĝi komencas malfortiĝi, kam tiam ni sukcesos – certe!

Almqvist provis iĝi kamparano, sed fiaskis. Li estis tro maljuna por reformi sin, kaj detruita de kulturo.

Cetere, li izolis sin en la kamparo. Se li

fondus terkulturistan asocion, eble li sukcesus. Sed pro lia fiasko, ne nepre fiaskos ankaŭ aliaj nun sub novaj kondiĉoj.

*Naŭe: Ni maljunuoj estis fidelaj al la idealoj de nia juneco.*

Tiam vi estis stultaj, ĉar la idealojn de via juneco diktis la tiam ĝenerala reakcio.

Nia bonfamo estas nia malfideleco al la reakciaj idealoj de nia juneco.

*Deke: Ni certe ne forlasis la kredon de nia infaneco.*

Tio certe estas via mizero. Ni kredis je fantomoj kiam ni estis infanoj, sed je nia honoro ni forlasis tiun kredon de nia infaneco.

Kaj vi elsendas misiistojn por rabi de la nigruloj la kredon de ilia infaneco. Vi do kredas nur ja la kredo de via propra infaneco, kaj nur ĉar ĝi estas utila al la supera klaso.

*Dekunue: Ne homoj estimataj atakas la socion.*

Ne, kaj ne mirige, ĉar la supera klaso, kiu donas estimon, donas ĝin nur al tiuj kiuj defendas la socion (= la supera klaso). Kaj se iu estimata atakus la superan klason, oni tuj forprenus de li la estimon, kaj tiam la supera klaso ja pravus.

La suba klaso estas tiel plenigita de tiuj mensogaj frazoj de la supera, ke ĝi ĉiam postulas estimon, moralon, bonan ekonomion kaj simile, tuj kiam iu ekdefendas ĝin.

Kial postuli tiaĵojn de amiko de la suba klaso?

Ĉu oni postulas moralon aŭ honoron de reĝo aŭ de liaj lakeoj? Kaj kiel ofte oni trovas tion ĉe ili?

Ĉu ne ankaŭ personoj kun malnoblaj motivoj povas malkovri trompon?

La policospiono estas pagata por trovi krimojn, kio ja estas malnobla motivo, sed liajn servojn oni tamen akceptas dankeme, kaj li estas traktata kiel amiko de socia ordo.

La reĝo ja regas por pago, kaj la pastro predikas pri Kristo la krucumito por pago; la juĝisto juĝas por pago. Kial oni ne kontestas ilin pro malnoblaj motivoj?

Tiam oni respondas: ili ja devas vivi!

Sed la amiko de la suba klaso?

– Li ne rajtas vivi!

Estas tute nekredeble kiel sklavigita la menso de la suba klaso estas en ĉi tiu okazo.

Tuj, kiam iu volas paroli favore pri ili, ili kritikas lin!

Sed kiam la supera klaso parolas malfavore pri ili, tiam ili akceptas ion ajn sen pridubi la informanton.

La trompitaj amikoj de la suba klaso havas frazon, per kiu ili provas pravigi tion.

Ili diras, nome: Ni devas postuli pli de ni mem.

Kial? Ĉu ni estas pli bonaj?

Sed tio ja estas aroganteco!

Ĉu oni ne postulu pli de tiuj, kiuj asertas ke ili regas pro la dia favoro, ol de tiuj, kiuj devas vivteni sin per iuj ajn rimedoj?

Se riĉulo ne ŝtelas, tio ne estas virto. Ĉar liaj riĉaĵoj jam estas ŝtelitaj kaj laŭleĝigitaj, do li ne plu bezonas ŝteli. Ne bezoni ŝteli, jen la virto.

La malriĉulo, kiu ŝtelas pro mizero, nur plenumas la plej simplan devon al sia vivo kaj sekvas la instinkton de memkonservo. La riĉulo kiu ŝtelis pro ĝuemo, tiu faras la krimon, sed li ne estas punata, male premiata. Komercisto, kiu profitegis el la mizero de aliaj, fine ricevas

ordenon pro “civitana merito”.

## Postparolo de la tradukinto

*"Kiel ofte oni ne trovas liberalulojn, kiuj estas ege konservemaj pri certaj aferoj."*

Tiel August Strindberg skribis en la supra teksto, kaj li mem donis bonan ekzemplon pri tio – verŝajne ne konscie – kiam li en ĝi pritraktis virinajn aferojn. Feministo li neniam estis, sed pri aliaj aferoj tre radikala.

Strindberg naskiĝis en Stokholmo en 1849 kaj mortis en la sama urbo en 1912. Internacie, li estas ĉefe konata kiel dramverkisto, sed en sia propra lando ankaŭ pro siaj romanoj, noveloj kaj fabeloj, kaj pro siaj ofte polemikaj faktekstoj.

Ĉi tiu teksto kompreneble apartenas al la tria kategorio. Ĝi estis verkata, verŝajne, en 1884, kiam la aŭtoro estis 35-jara kaj, ne por la lasta fojo en sia vivo, en ekzilo. Dum sia restanta vivtempo, li neniam sukcesis publikigi ĝin; ĝi aperis nur, post lia morto, en eldono de liaj kolektitaj verkoj.

Strindberg estas ĝenerale rigardata kiel unu el la ĉefaj verkistoj de la sveda lingvo – de kelkaj kiel *la* ĉefa verkisto – kaj li profunde influis ĝian literaturan lingvaĵon (kelkajn libron li tamen verkis en la franca).

En esperanto antaŭe aperis:

**Pario** (*Paria*), tradukita de Birjer Ström, eldonita en 1908 de Appelberg, Uppsala; reta reeldono de Inko 2000

**Fraŭlino Julie** (*Fröken Julie*), tradukita de Paul Axel Nylén kaj S. E. Krikortz, eldonita en 1908 dee Appelberg, Uppsala; reta reeldono de Inko 2001

**La insulo de feliĉuloj** (*De lycksaliges ö*), tradukita de Oskar Frode, eldonita en 1926 de Hirt, Esperanto-Fako, Leipzig (Internacia Mondoliteraturo 17) ; reta reeldono de Inko 2000

**La konscienco riproĉas** (*Samvetskval*), tradukita de Gustaf Henrik Backman, eldonita en 1928 en Malmö; reta reeldono de Inko 2000

**Pasko** (*Påsk*), tradukita de Stellan Engholm, eldonita en 1933 de Eldona Societo Esperanto, Stockholm; reta reeldono de Inko 2000

**Sonĝodramo** (*Ett drömspel*), tradukita de Sten Johansson, eldonita en 1999 de Al-fab-et-o,

Skövde

**Insulanoj de Hemsö** (*Hemsöborna*), tradukita de Sten Johansson, eldonita en 2005 de Mondial, New York